

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFANTA ★

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egalvaloro.

Protaktantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
I. Gili Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikk-  
direktoro, Kaunas.

**N-o 228**  
**31. 12. 1924**

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:

H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo ponumera  
de duonsemajna ekspedado: egal-  
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per  
loka poŝtoŝeĉo 0.15 sv. fk.;  
de semajna ekspedado (du numeroj  
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo  
po unucentimetre kolonero egalvaloro  
de 2.— sv. fk. (antlapiĝe 1.50 sv. fk.),  
minimuma alteco 5 cm.

**Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa**

### La lasta numero de ET.

Al mia „Esperanto Triumfanta“.  
Ĉu via kresko estos via morto?  
Ni malĝojas, ho ET, pro via sorto.

Al mia Legantaro.

Ne malesperu! ho kara leganto:  
Mi fariĝos „Heroldo de Esperanto“!  
C. M. V.

ET mortas. La hodiaŭa numero estas la lasta. Dum preskaŭ kvin jaroj proksimume septent mil ekzempleroj disflugis en la mondon, anoncante al la vasta publiko la venontan triumfon de Esperanto. Nun ĝi devas morti. La „seriozuloj“ de nia movado tiel decidis. Ili diris, jam en la komenco de la aperado de ET, ke la ĝisnuna titolo sonas fanfarone kaj povus malinklinigi al nia afero la favoron de serioza publiko. Kaj ili estas pravaj. Ili sukcesis fine konvinki nin. Tial ET devas morti, kaj ĝin anstataŭos „Heroldo de Esperanto“.

Multaj nun bedaŭras la ŝanĝon de la titolo. Sed kio estas decidita, tio jam devas efektiviĝi. Ni esperas, ke la nova titolo baldaŭ enradikiĝos same, kiel nun ŝajnas enradikiĝinta ET.

Starante je la fino de la jaro, ni volas fari la kutiman bilancon pri la faktoj de la pasinta jaro. Ĝi povas kontentigi nin. Ni almontras antaŭ ĉio la rezolucion de la Ligo de Nacioj pri Esperanto kiel klara lingvo en telegrafa kaj radiotelegrafa servado, kiu en sia formo prezentas oficialan rekonon de Esperanto per la Ligo de Nacioj. Plue ni rememorigas pri la grava dekreto de Prusa Ministro por Scienco, Arto kaj Popolklerigado de 10. 3. 1924 koncerne fakultativan instruon de Esperanto en lernejoj, post antaŭirintaj similaj dekretoj en la germanaj federaciaj ŝtatoj Heslando, Brunsvigo kaj Saksujo; — pri la Prepara Konferenco por internacia radiotelefonika interkonsento en Genève, 22—23. 4. 1924, kiun partoprenis reprezentantoj de 39 stacioj, societoj, kompanioj aŭ administracioj de Radio, de Telefono aŭ Telegrafo el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo, Ĉeĥoslovakio, Nederlando kaj Svislando, inter kiuj estis dekoj da personoj sciantaj Esperanton kaj aliaj parolantaj precipe france, germane kaj itale; — pri la poresperanta deklaro de la Brita Asocio por Progresigo de Scienco; — pri la aplikado de Esperanto en radiodisaidigo (arangoj pri kaj en Esperanto); — pri la favorigo de influŝtataj mondkonataj ĵurnaloj, ekz. Berliner Tageblatt, Berliner Börsen-Courier k. a.; finfine pri la XVI-a Universala Kongreso en Vieno, kiu ja rezultiĝis tre altan deficion, sed benefikis en Vieno mem kaj en la tuta aŭstra respubliko.

Ni opinias, ke ne estas malmodeste, se ni kalkulas inter la grandaj sukcesoj de nia movado ankaŭ la duonsemajnaĵon de nia ĵurnalo.

Duonsemajna esperantista ĵurnalo! Kiu estus pensinta pri ĝi antaŭ kvin-ses jaroj? Kiam la eldonanto de ET unufoje proklamis sian intencon krei ĉiutagan esp. ĵurnalon, multaj deklaris ĝin utopio kaj mokis pri ĝi. Nun jam ekzistas la duonsemajnaĵo. De tie ĝis ĉiutaga ĵurnalo, certe, estas ankoraŭ sufiĉe granda paŝo, sed ĝi ŝajnas hodiaŭ tute atingebla.

Provizore mankas ankoraŭ mil abonantoj por eldoni la duonsemajnan esp. ĵurnalon sen deficio. Ilin plej baldaŭ akiri estas nun nia ĉefa zorgo. Nur kiam ili estos akiritaj, ni povos pensi pri denova pliperfektiĝo de nia ĵurnalo. Tial helpu ĉiu laŭpove per varbado de abonantoj kaj anoncoj, por plifaciligi niajn proprajn klopodojn!

Al ĉiuj niaj legantoj ni deziras

Feliĉan Novan Jaron! T. J.

En la unua numero de „Heroldo de Esperanto“ ni komencas la publikigon de grava dokumenta verketo de Edvardo Wiesenfeld L. K.:

### La Galerio de Zamenhofoj

kun genealogia tabelo kaj kun multaj ankoraŭ ne publikigitaj portretoj laŭ fotografajoj.


### Impresoj de la fervejteknika ekspozicio en Berlin-Seddin

fermita je 19 oktobro 1924.

Bonan superrigardon pri la nuna stato de la ferveja tekniko en Germanujo ricevis la vizitanto ĉe la ferveja ekspozicio teknika en Berlin-Seddin. Ligita kun plurtaga scienca kunveno kaj multaj aliaj arangoj ĝi peris al la fakulo efikajn impresojn. La ekspozicio estis vizitata de multaj personoj en- kaj eksterlandaj, inter ili ankaŭ multaj fakuloj. Konsiderante tion, la legantoj komprenos

Tre interesa maŝino estis la plej nova „Diesel-elekto-lokomotivo“, konstruita laŭ planoj de Prof. Meinicke kaj lokomotivfabriko Hohenzollern-Düsseldorf de la maŝinfabriko Esslingen por Sovet-Ruslando (bildo 3).

La principa diferenco kontraŭe al vaporlokomotivo konsistas en tio, ke oni efikas la brulmaterialon rekte interne de la cilindro. Do, oni



Turbino-lokomotivo laŭ Krupp-Soelley.

la gravecon de ĉi tiu ekspozicio rilate al teknika progreso tutmonda.

Estas tute neeble priskribi per gazetartikolo kvanton kaj kvaliton de ĉiuj prezentajoj.

En granda halo troviĝis, flanke de aliaj ĉi tie ne nomataj objektoj, interesaj novaĵoj de signal- kaj sekurig-instalajoj. Plue multaj specialmaŝinoj ekz. tornstabloj de ĉiu speco, bormaŝinoj, veldiloj ktp.; novaj metodoj por konservado de


evitas la kurban vojon estantan ĉe la vapormaŝino: krudmaterialo, fajrejo, kaldrono, cilindro. La transiĝo de la energio al radoj okazas per elektra mekanismo.

La efikgrado de tiu lokomotivo rilate al ekonomiaj vidpunktoj kompare estas tre granda. La plej moderna piŝto-lokomotivo aligas 6—7% varmec-energien de la brulmaterialo en laboro, 93—94% perdiĝas. La maŝino, montrita per bildo 3, eluzas 21—26% de la brul-energio, t. e. forbrulas 3 1/2-oble malpli ol vaporlokomotivo. Estas evidente, ke tiu lokomotivo havos grandan estonton en landoj havantaj provizojn de minerala oleo. Tia lando estas Rusujo.

Bildo 4 montras elekto-lokomotivon, kiu funkcias de 1917 sur elektraj fervojlinioj germanaj. Ĝi estas normala maŝino sen karakterizajoj.

Por aligi la ekonomiecon de la transportado de komercaĵoj estas nuntempe konstruataj en Germanujo vagonoj portantaj 50 milkilogramojn. Tiel grandajn ŝarĝkvantojn oni ne povas elvagonigi permane. La elvagonigo do okazas per malkomplika mekanismo alkonstruita.

Bildo 5 montras tian vagonon Rimarkeble estas, ke tiu vagono ankaŭ havas aŭtomatan kuplajon laŭsisteme Scharfenberg. En Germanujo ĝi estas enkondukita ĉe kelkaj privataj fervojlinioj. La aŭtomata kuplajo havas grandan signifon ne nur por la ekonomieco de la funkciado ferveja, sed ankaŭ por fervojlaboristoj. Estas




La unua vaporlokomotivo de la mondo, konstruita de Richard Trevithick en 1803 (Anglujo).

reliŝtupoj; maŝinoj por konstruo de relvojoj, ŝtop-aparatoj mekanikaj, ĉiuspecaj gruoj kaj transportiloj ktp.

La atrakto de la ekspozicio estis la veturiloj surrelaj. 120 lokomotivoj kaj motorveturiloj, diversaj laŭ arango kaj grandeco, 140 vagonoj por vojaĝantoj kaj ŝarĝaĵoj estis ekspozitaj. Ĉiuj sistemoj oni povis vidi. La plej gravajn ni volas nun pritrakti.

Komparite kun la unua vaporlokomotivo de la mondo (bildo 2), la modernaj lokomotivoj rilate al siaj dimensioj kaj proporcioj estas veraj grandeguloj. Tia grandegulo estas la nova turbino-lokomotivo konstruita de la mond fama firma Krupp en Essen (bildo 1). Ĉe tiu maŝino la vaporo ne efikas per piŝtoj, sed per du vapor-turbinoj. La rotacio estas transigata al la radoj per dentrada mekanismo. En kondensilo la eluzita vaporo estas densigata kaj kiel nutroakvo ree kondukata al kaldrono. La konsumo de akvo do estas malgrandega. Sur la tendro troviĝas la malvarmigaj instalaĵoj por la foriĝa vaporo.


La karbkonsumo de tiu lokomotivo devas esti 20% pli malalta ol ĉe moderna piŝto-lokomotivo.



Diesel-elekto-lokomotivo por Sovet-Ruslando.

konate, ankaŭ en nefakaj rondoj, ke la kuplado kaj malkuplado per ordinaraĵoj kuplajoj estas tre danĝera laboro. Certe, akcidentoj ĉiam okazos, sed oni povas plimalgrandigi ilin per taŭgaj arangoj. La tekniko jam longe donis al ni tiajn rimedojn: nacieca kaj industria egoismoj mal-





Elektra lokomotivo de la ŝtateferojo germana.

helpis la ĝeneralan enkondukon de aŭtomata kuplaĵo ĉe la internacia fervojo. La laboristoj estas la suferantoj. Do estas salutinde, ke la Internacia Labora Konferenco, kunsido okazinta en Ĝenevo en 1922, alprenis rezolucion fari preparan studon pri aŭtomataj kuplaĵoj ĉe fervojoj, precipe laŭ la vidpunkto de la sendanĝereco de fervojo-laboristoj. Laŭ sciigo de la Internacia Labora Oficejo, la rezultoj de la studo estas ĵus eldonitaj en statistika raportoj bazita sur sciigoj rilataj al dekkvin landoj kaj ĝenerale al periodo de dek jaroj.

La konkludo de la raportoj estas, ke la aŭtomataj kuplaĵoj, kie ili estas enkondukitaj, estas tre profitaj al la fervojo-laboristoj. La grava modifo, kiu fariĝis de la usonaj fervojoj, rezultigis plibonigon taksoblan je 70 aŭ 80% pri mortigaj, kaj 80 aŭ 90% pri mortigitaj akcidentoj kaŭzitaj per kuplado kaj malkuplado.

Esperu ni, ke la teknika fervoja ekspozicio plenumis sian taskon ankaŭ al tiu flanko. La apliko de aŭtomata kuplaĵo estas necesa kaj urĝa postulo de la fervojistaro tutmonda por estonte sendanĝerigi la malfacilan laboron. Ĉi tiu postulo povos esti realigata sole je internacia bazo kaj interkonsento.

G. Pietsch, Berlin.

## La Tago de Esperanto.

(Rim. de red. El plej diversaj flankoj ni ricevis detalajn raportojn pri la Zamenhof-memorfesto; sed la manko de loko ne permesas al ni publikigi ilin. Sekvu jen nur unu detala raportoj, tiu pri la aranĝo de „Konkordo“ en Warszawa, kiu estas precipe menciinda pro la loko, kie ĝi okazis, kaj pro la personoj, kiuj ĝin partoprenis.)

### La Tago de Esperanto en „Konkordo“ 15. 12. 1924.

(Anstataŭ decembra komuniko.)

La tuta mondo solene festis la daton de la tago, kiam la unuan fojon ekvidis la lumon nia Majstro. Ĉie, en ĉiuj terpartoj la samideanaro ĝojis, ke antaŭ 65 jaroj naskiĝis la geniulo, kiu donacis al ni la interkomprenigon en la formo de Esperanto. Sed neniu urbo povas al si permesi tion, kion povas Varsovio. Nin samideanarojn havantaj la feliĉon loĝi en la sama urbo, kie vivis kaj kreis nia Majstro, nin favoris la sorto, ke ni povas tiun tagon festi kune kun la tuta familio.

Ĉiuj Zamenhofaj alvenis por honoro per sia partopreno la feston.

## Dum tiu nokt' . . .

Rusa romano.

Dum tiu nokt' spiranta flodorodoin  
De l' am' pasia ravo regis min;  
Amirene ĉe l' fenestro longajn horojn  
Mi sidis sola kaj atendis vin.

Siringerom' saturis la aeron.  
En luna bri' dormetis la ĝarden'.  
Kaj tremaj ombroj falis sur la teron,  
Kaj kredis mi je via tuj ven'.

La varma nokt' ardigis la pasion,  
Ĝi kiel via kis' bruligis min.  
Kaj mia koro volis pli nenion  
Krom havi vin, krom ami, kisi vin.

Mi neston nian kovris per la floroj;  
Por vi nur sola batis mia koro'.  
Por mi moment' egalis tujajn horojn.  
Mi vin atendis, sed . . . vi estis for.

Terura nokt'! La koron duĵoj premis,  
Sopirej pensoj, plor' turmentis min,  
Ĉis kiam tute klare mi komprenis,  
Ke ne por mi la sort' destinis vin

Ne kis' pasia kreas fortan amon.  
Por tia amo ne kapablis vi, —  
Vi, ne veninte, eviligis dramon,  
Kaj kore vin pro tio dankas mi.

Tradukis A. Lavrov, Tjumen.

## La donaco de la linkino.

De A. Remizov.\*

El la ciklo de apokrifaj-popolaj rakontoj  
„Travá-muravá“ (Silke-verda herbo).

En arbara ermita ĉelo vivis maljunulo.

Li estis riftiĝinta en la ĉelon por pia agado, puriganta la pensojn de vantaĵoj kaj la koron de tenoj.

En la mondo pasioj blindigas homon, kaj tre ofte homoj tie servas nur al siaj pasioj, pensante ke ĝi estas la servado por la mondo. De tia vivmaniero neniam helpo venas al homoj krom

En ĉeesto de ĉirkaŭ 100 personoj en salono bele per esperantaj ornamita, inter kiuj ĉefan lokon okupas la busto de nia Majstro, afable por tiu vespero pruntedonita de l' aŭtoro artisto-skulptisto Gabowicz, ĉirkaŭ 8 50 h. malfermis la vesperon en la nomo de l' estraro de „Konkordo“ s-o Wiesenfeld, kiu post dediĉo de kelkaj vortoj al s-ino Zamenhof proponis honoro ŝian memoron per levigo. Mute ĉiuj staras dum du minutoj. Poste, je la ĝojo de l' ĉeestantoj, okupas la prezidlokon speciale tiucele invitita D-o Leono Zamenhof.

Post la invito al sekretariato de f-lino D-o Muszkatblait, D-o Leono Zamenhof donacis al ni malgranda sed enhavoplena paroladon, en kiu li substrekis la specialan signifon de l' hodiaŭa tago. Li diris:

Estimataj Ĝesamideanoj!

Mi kun plezuro akceptas la honoron prezidi la hodiaŭan vesperon. Kunvenis ĉi tien reprezentantoj de diversaj societoj por kune festi la naskiĝtagon de la jam ne vivanta kreinto de Esperanto. Antaŭ kelkaj tagoj kun ĉeesto de tiu ĉi sama rondo ni redonis al la tero por eterna ripozo Klaron Zamenhof, kiu oni tute prave nomis spirita patrino de Esperanto. Nun Esperanto fariĝis orfo kaj iros en la mondon sen gardo de siaj gepatroj. Kio okazos kun ĝi? Ĉu ĝi iros sian vojon rekte ne deŝanĝante? Ĉu ne malbonuzos ĝin la mondo, kiu penas ĝin rigardi kiel senaniman malvivnan estaĵon? La estonto ne dependas de ni kaj kaŝas sin en nuboj de neceriteco. Mi tamen profunde kredas, ke tio, kio en Esperanto estas ĝia esenco, kio instigis ĝian kreinton ĝin naski, ne povos pereti tute: kiel radikoj ne elsirebla ĝi ĉiam leuos sur la fundo de nia ideo, ĉar ne pripensbla estas uzado de komuna lingvo sen almenaŭ parta inklino al interpaĉigado.


Hazardo kunvenigis nin hodiaŭ en la loĝejo de surdmutuloj, i. e. homoj, kiuj nek aŭdas nek parolas. Ni kultivas homojn ilie plej malfacilaj homoj en la mondo. Tiu duonfilo de la sorto ne posedas ilon, kio ŝajnas por ni ĉiuj esti plej bela donaco, kiun la naturo donis al la homo. Tiel opinias tiuj, kiuj pri la surdmutuloj persvas nur teorie. La ofta knustado kun tiuj ĉi malfaciluloj lernas nin rigardi la eteron tute alie. Je la vidpunkto de vivbatalo, kompreneble, la aŭdado kaj parolo estas por ni necesaj. Je la vidpunkto de animfeliĉo ili ne ĉiam alportas al ni bonon. Precipe tio ĉi estas aplik-ebla al la parolo. Donante al ni elbon ĝin la belan kulturon de miljaroj, ĝi samtempe starigas barojn inter la homojn devigante ilin gardi siajn lingvojn kiel propraĵon. Nenio konvinkis min tiel klare pri la graveco de neŭtrala interkomprenilo, kiel la surdmutuloj. Mi vidis ilin fiam, kiam oni lernigis al ili tiel nomatajn lingvojn naĉajn, mi vidis kiel kune kun tiu ĉi lernado iliaj animoj ensorbis la venenon de naĉa individualeco. Mi vidis tiujn samajn surdmutulojn, kiam ili parolis inter si en sia neŭtrala lingvo de gestoj. Ili vinzaĵoj evidenti-gis ion tute alian, la esprimon de amikeco, fraĝigo elŝutis el iliaj movoj. Forlasita al si mem ili sentis sin kvazaŭ rondo familia.

Tiu elokventa fakto konvinkis min, ke en neŭtrala interkomprenilo, ĉe tiel ne perfekta kiel lingvo de gestoj, estas keŝita io, kio ne dividas sed ligo la homojn. Estu do ekzemplo de surdmutuloj instigo al ni ĉiuj paroli kiel eble plej ofte nian lingvon! La rezultato venos mem!

La hodiaŭa tago per sia ĉiujara ripetiĝo estu rememorigilo al ni en tiu ĉi direkto! Estu ĝi por ni ĉiuj kaj en ĉiuj landoj la vera „Tago de Esperanto“!

Tondro da aplaŭdo estis la plej elokventa esprimo de l' ĉeestantaro.

Nun la sekretariato iralegas la multnombre alvenintajn salutuletojn. Laŭ propono de l' prezidanto estis unuanime decidate publike danki por ĉiuj salutuletoj; inter kiuj pleje distingigis tiuj



Vagono por ŝarĝkvantoj de 50 milkilogramoj, havanta aŭtomatan kuplaĵon laŭsisteme Scharfenberg.

de „Esperanto Triumfonta“, de M. Cather (el Por-Said), E. J. Bengough (Toronto, Kanado) kaj Rokzano (Marseille).

Poste Prof. D-o Odo Bujwid, prez. de Pola Esperanto Asocio, iralegis siajn rememoraĵojn pri la studentaj jaroj, dum kiuj li estis kune kun nia Majstro en la sama universitato.

S-ino Cense faris beleĝan prelegon s. t. „Zamenhof kiel poeto“. Ĉiuj grandaj homoj estas konataj sen titoloj kaj sen antaŭnomoj (Byron, Shakespeare, Voltaire k. a.), same Zamenhof restos por ĉiam nur Zamenhof sen „D-o“ kaj sen „Ludoviko“. Ŝi analizis ĉiujn poeziaĵojn, en kiuj ŝi speciale substrekis tiun internan ideon, kiu ŝprucas el ĉiu lia verko, kaj precipe el la „Preĝo sub verda standardo“.

Se — finis ŝi — de tempo al tempo el niaj vicoj foriras iuj, tio nin ne maledperigu. Zamenhof forte kredis en la fina venko de ŝia ideo, kaj la diversaj foriradoj ne nur de li ne forprenis la esperon, sed kontraŭe donis eĉ certan kontentigon, ĉar pro firo de purigantaj partoj la organismo refreŝiĝas kaj pli bone disvolviĝas.

S-o Wiesenfeld iralegis fragmenton el sia verko s. t. „La Galerio de Zamenhofaj“. (La leganto povos konatiĝi kun tiu verko jam en la unuaj numeroj de „Heroldo de Esperanto“.)

Nun sekvis paŭzo, dum kiu fotografisto, speciale de l' varsovia gazetaro, fotografis la ĉeestantaron.

Post la paŭzo verŝis grandegan dozon da vigligo s-o Kos, sek. de „Laboro“, per siaj brilaj akraj, satiraj fragmentoj pri la esp. vivo kaj rilatoj. La aŭdantaro entuziasmiĝis dankis lin per longedaŭra aplaŭdo.

S-o advokato Litauer iralegis pote fragmentojn el la „Vivo de Zamenhof“ (de Privat) en sia propra traduko.

S-o Bronstein finas la vesperon per deklamo de beleaga esp. poeziaĵo speciale verkita por „Konkordo“ sub titolo: „Ni ĵuras“. (La aŭtoro ne permesas malkaŝi lian nomon.)

La prezidanto fermas la vesperon per danko al la organizintoj („Konkordo“), partoprenintoj (ĉiuj varsoviaj societoj) kaj ĉeestantaro.

Post la himno „Espero“ ĉiuj disiris.

Edvardo Wiesenfeld, L. K.

Varsovio, 16. 12. 1924.

alarmiga malordo, en kiu eĉ la plej bona amiko embuske kaŝas kontraŭ vi ponardon sub la maniko.

La maljunulo vivas en la arbaro perfektigante sin mem, kaj li atingis tre grandan virtecon kaj bonanimecon, kaj liaj agoj kaj konsiloj multe plifaciligis la komplikajn vivon de homoj en tiu ĉi neportebla ĉagreniga tempo.

La maljunulo nur tre malfoste eliris en la eksteran mondon, pli ofte oni lin vizitis en la arbaro.

Tre diversaj homoj venis al la maljunulo — jen kun konfuzitaj sentoj, jen punitaj de sia propra konscienco, fizike malsanaj ĉu pro tio ke oni devas multe suferi por atingi animan perfektecon, ĉu pro tio ke la tremigita animo kripligis la funkcion de la korpo.

La maljunulo laŭ la rigardoj kaj vortoj turnita al li komprenis per la forto de sia spirito la malsanojn de la vizitantoj kaj poste ĉiam kun paco adiaŭis la lastajn.

Foje la maljunulo sidis en la ĉeĉeto, parolante kun Dio per la lipoj de sia hela koro kaj ekaŭdis, ke iu ekfrapis sur la pordon.

La maljunulo vokis. Nenia respondo. Eble la aŭdsento lin trompis?

Denove pensigis la maljunulo pri maldoleo kaj tentigo de pasioj kaj pri la tuta falso de la mondo.

Sed jen denove! Ho ne, estas klare, ke iu frapis ĉe la pordo — Kiu do estas tie?

La maljunulo iris por malfermi la pordon kaj trovis post ĝi — linkinon kun sia juna linkido: la linkino pelis la linkidon antaŭ si kaj per la levita piedo kvazaŭ montris: — Ĝi estas blinda, mia linkideto, kuracu ĝin!

Diversaj homoj venis al la maljunulo — anime malsanaj kaj pro malsana animo korpe suferantaj, pli primitivaj kaj simplaj ol besto, ol rampaĵo, ol vermo, sed bestoj neniam ankoraŭ vizitis lin.

Sed la apero de la linkino kaj linkido ne embarasis la maljunulon, ĉar, estante klarvida homamanto, li scias, ke ofte homo, la fiero kaj

krono de teraj kreaĵoj, naskiĝas en la mondo kun spirito multe pli sovaĝa ol tiu de besto, rampaĵo aŭ vermo. Farinte preĝon, la maljunulo kraĉis en la blindajn okuletojn de la linkido, kaj je la granda ĝojo de ĝia patrino la linkido subite komencis ĉirkaŭrigardi.

La vojo ĝis la arbara ermitejo ne estis mallonga, la linkido ekmalŝatis kaj ĝia patrino kuŝiĝis apud la sofo de la ĉelo por mamnutri la idon.

Nurinte ĝin la linkino levigis kaj riverencis al la maljunulo: „Dankon, multan dankon al vi!“ kaj ekkuris hejmen pro feliĉo ŝvingante la voston, havante ĉe la flanko la linkidon, jam vidantan kaj viglan.

— Kia prudentulino! — pensis la maljunulo.

Kaj beninte la krepuskiĝantan bonan tagon la maljunulo fleksis la genuojn por vespera preĝo.

II.

Ni kalkulas tagojn, kaj niaj tagoj pasas zorgoplenaj; ni timas okazintaĵojn kaj la plej maldolecan el ĉiuj okazintaĵoj — morton; ni rapide forgesas la bonon, kiun faras al ni homoj, kaj ni longe memoras ĉion malbonan kaj malican; ni revas pri feliĉo, kiu, ni pensas, estas atingebla en tiu ĉi mondo per la venko kontraŭ la ekstera, kaj ni trompas la aliajn, kiam ni promesas al ili pacon kaj kvieton en la malpaca kaj malkvieta organizo de nia vivo; ni mensogas al ni mem por iom distriĝi kaj ni mensogas al la aliaj por deturni ilin de la terura, neportebla vero de la vivo, ĉar nia vivo kaj la vivo de ĉiuj kreiĵoj, komencante de herbeto ĝis la nevideblaj spiritoj, kiuj incitas nin kaj kontraŭ kiuj ni batalas, estas ne pli kaj ne malpli ol konstanta perforto, videbla aŭ kaŝita, de ĉiu kontraŭ ĉiu —: „Ho vi, blinduloj, kiuj krias kontraŭ milito kaj mortigo, kvazaŭ en la mondo ne ekzistus tiu konstanta milito!“ Ĉiu homo, kiu ankoraŭ havas okulojn kaj sentojn, klare ĝin vidas kaj aŭdas kaj sentas.



## Radio. Urĝa peto.

Estu aktivaj kaj uz Esperanton kiel eble plej praktike! Havu kuraĝon, se vi ne posedas ricevoaparaton, peti radiiston por regule aŭskulti al la esp. lecionoj! Sendu senprokraste nur la klare aŭditajn esp. vortojn per poŝtkarto al koncerna stacio: tiel ne nur vi uzos Esperanton praktike sed vi faros netakseblan tre, tre unikan propagandon, pli ol vi povas imagi, kaj grave faciligos la laboron de la elsendanta instruanto, kiu siavice povos utiligi la materialon taŭge por plifacile helpi konvinki aliajn staciojn ke ankaŭ ili disaŭdigu lecionojn aŭ paroladojn en Esperanto.

Bonvolu ne prokrasti tiun ĉi gravan devon, pensante ke aliaj personoj sendube skribos! Faru ĝin vin mem, faru ĝin baldaŭ, faru ĝin tuj, la saman vesperon!

La tempo urĝas, kaj ni nur formos la internacian ligan, kiun la radiistoj urĝe bezonas. Lasu ni helpi ilin; samtempe ni helpos nin!  
Samideanoj, sciuj vian devon!  
G. v. H.

## Königsberg Pr. dissendos Esperanto-kurson.

La radiostacio Königsberg Pr. (ondo 463) komencos dissendi Esperanto-kurson meze de januaro, merkrede kaj sabate de 7.30 ĝis 8 h. vesp. (mezeŭropa tempo). Antaŭ la kurso estos dissendata germanlingva parolado de D-o Niŝ pri disvastiĝo kaj utileco de Esperanto la 14. 1. je 7.30 h. vesp. Adreso por aprob-skriboj: Ostmarken-Rundfunk-A.-G., Königsberg Pr., Stadttheater.

## Paroladoj pri Esperanto de stacio Münstere.

Nederlanda samideano en Nijmegen sciigas nin, ke li ricevis de Westdeutsche Funkstunde en Münstere la 19. 12. informon pri presierantaj paroladoj okazontaj la 23. 12., 10 h. vesp., kaj la 29. 12., 8 h. vesp. La stacio intencas disaŭdigi esp. kurson, se alvenos sufiĉe da petoj. Adreso: Westdeutsche Funkstunde A.-G. Münster i. W. — La nederlanda samideano konfirmas, ke li jam bone atidis la unuan paroladon, kaj ke entute la stacio Münstere estas bonege aŭdebla en tuta Nederlando.

## Internacia Konkurso „G. Bianchi“ pri „la lingva problemoj de Radiotelefonio“.

(Rim. de red. Kvankam la konkurso ne aligas verkojn skribitajn en Esperanto, ni tamen instigas nian legantojn partopreni la konkurson en unu el la aliaj kvin lingvoj.)

- Scienca kaj lit. Akademio „Masino Della Scala“ en Verona starigas Internacian Konkurson por aliĝo de Premio K.-m. Gaetano Bianchi pri la temo: „La lingva problemoj de Radiotelefonio“.
- La temo devos esti pritraktata en skribaĵo de maksimume 50 paĝoj 25-liniaj maŝinskribitaj.
- La verkoj povos esti skribitaj en unu el la sekvantaj lingvoj: itala, franca, angla, germana, hispana.
- La karaktero de la verko devos esti teoria-praktika, konsideri la spertojn de la lastaj jaroj kaj difini rilatojn inter la scienca bazo de radiotelefonio kaj la progresoj de ĝia praktika aplikado internacia pere de la homa parolo.

La maljunulo ekvidis, ekaŭdis kaj eksentis la teruran veron de la vivo kaj, forlasinte ĉi tiun vivon, li plu ne kalkulis la tagojn kaj timitis plu nenion; la maljunulo vivis laŭ la volo de Dio, delogata nek per felico nek per ripozo en la mondo de laboro kaj neeviteblaj doloroj; la maljunulo memoris nek bonon nek malbonon de homoj kaj li forgesis pri la linkino kaj ĝia blinda ido, al kiu lia preĝo havigis la vidkapablon.

Kaj jen ree sidas la maljunulo en sia ĉelo, parolante kun Dio, kaj aŭdas, ke la trapas sur la pordon. Li vokis sed neniu respondis.

Ree iris la maljunulo por malfermi la pordon, kaj li ekvidis la linkinon solan, sen la linkido. Sin levinte sur la malantaŭaj piedoj, la linkino metis antaŭ la piedojn de la maljunulo ŝafan felon.

— Jen estas por vi rekompenco por la kuracita linkido! Tre ekmiris la maljunulo, neniam li atendis ricevi tion de la linkino, kaj kun danko li rigardis la ĉielon, por kiu estas kreita homo kaj ĉiu kreaĵo sur la tero, sed mallevinte la okulojn li eĉ pli multe ekmiris: apud la felo kuŝis senfeliga ŝafo.

— Ho, mia Dio, pro kio, mi havas tiajn dolorojn — kvazaŭ diris la suprenturnita okuloj de la ŝafo, kaj apud la ŝafo staris maljunulino Efrémovna kaj per sia tremanta kapo senvorte plendis:

— Ho, mia Dio, kion mi faros nun, la lastan ŝafon oni rabis de mi!

La maljunulo ŝvingis per la mano kontraŭ la linkino:

— Mi ne bezonas la felon, ci pereigis la ŝafon, forprenis la lastan havaĵon de la maljunulo, mi ne prenus la felon!

La linkino rimarkis nek la ŝafon, nek la maljunulon, ĝi komprenis ke ĝi faris ion malkonvenan, kaj per la piedo kvazaŭ klarigis al la maljunulo:

— Mi ja ne scias tion, mi nenion pensis, mi volis nur rekompenci vin pro la linkido!

5. La skribaĵoj devos alveni ĉe l' Sekretariejo de Akademio Masino Della Scala (Via Tropa, 6, Verona, Italio) per registrita sendo antaŭ la 11. 3 1925. Ili ne estu subskribitaj sed nur signitaj per devizo, ripetota sur fermita kovriletu entenanta la nomon kaj precizan adreson de la konkurstanto.

6. La verkoj estos juĝataj dum monato aprilo 1925 de kvinmembra Komisiono, elektita de l' Akademio kiel sekvas: Mons. Prof. Luizo Cerbofani, mondfama scienculo (Verona-München), Adv. D-o Alberto Gabrielli, del. kons. de l' Akademio Masino della Scala, Gav. Mario Carelli, radioteknikisto, Ing. Emilio Corazza, radioindustriisto (Verona) kaj Nob. D-o Prof. Umberio Toschi, dir. de mezlernejo, lingvisto (Bologna).

7. Al la plej bona verko estos aljuĝata la premio, konsistanta en arto Diplomo kaj sumo de itajlaj litroj kvincent. La Akademio rezervas al si la rajton aljuĝi aliajn premiojn al la verkoj fakitaj kiel indaj.

8. Ĉiuj decidoj de la Komisiono estos scigataj al la interuloj antaŭ la 15. 5. 1925

9. La Akademio rezervas al si la rajton publikigi per la rimedoj, kiujn ĝi decidis, la premiantan verkon kaj la aliajn fakitajn kiel indaj je tio.

10. Ĉiuj proprajtoj restos tamen al la aŭtoroj.

11. Neniu skribo estas resendata.

12. La membroj de la juĝkomisiono ne povos partopreni la Konkurson.

## Kroniko.

### Britujo.

Liverpool. Zamenhof-festo okazis la 19. 12.; ĉeestis pli ol 50 esp. istoj kaj 20 knaboj el la taglernejo, kie oni instruas Esperanton. Fesparolado, kantoj kaj deklamoj. S-o Applebaum deklamis kelkajn speciale verkitaĵojn okazante de la morto de s-ino Zamenhof.

### Bulgarujo.

Vilaĝo Sadovec. Funkcia kurso kun 15 p., precipe geinstruistoj. A. L.

### Ĉeĥoslovakio.

Košice. La 18. 12. finiĝis du kursoj por komencantoj, por ĉeĥoj kaj slovakoj kun 16 kaj por hungaroj kaj germanoj kun 12 p. La 1. 12. komenciĝis kurso por ŝtataj policoj, kiun vizitadas 50 policoj. Tri novaj kursoj, du por komencantoj kaj unu por progresintoj, komenciĝis la 8. 1. 1925. — La 14. 12. okazis Zamenhof-memoro, samtempe kun interkonataĵa vespero de orient-slovakiaj esperantistoj. Festparoladis la prez. s-o Friedrich; la gastojn salutis la vicprez. s-o Krémér; salutiparolis delegitoj el Bardiöv, Prešov, Poprad kaj Sabinöv.

### Francujo.

Castelnau-audary (Aude). Unua esp-isto en tiu ĉi urbo, s-o Ambroise Carrère (varbita de s-o René Llech), preparas propagandon.

Paris. La 14. 12. okazis en preĝejo St-Jean de Montmartre la beno de la standardo de Katolika Esp. Ligo; ĉeestis pli ol 100 s-anoj. Predikis en Esp. abato Devaux, parohestro. Favore raportis pri la ceremonio „La Croix“, ĉefa kat. gazeto, kaj „Le Matin“. — La 23. 12. s-o Delanoue paroladis en la grupo de Bourg-la-Reine.

Pernigian. La 21. 12. okazis Zamenhof-festo en Hotel du Helder. Parolis s-o Jean Llech, prez. de Amika Rondo.

### Germanujo.

Chemnitz. Depost la jaro 1921, Esperanto estas laŭplane instruata en la popolernejoj de nia urbo al tiuj 10-14-jaraj infanoj, kiuj libervole anoncas sin por tio. La nombro de la infanoj, kiuj partoprenas dum tiu ĉi jaro, estas 364. Tio estas tre gajla.

Kirchner. La ĉemperia esperantistaro festis la 20. 12. la naskiĝadon de nia majstro per paroladoj, kantoj, dialogoj, ŝercoj kaj modela prezentiado de „Glavo de Damokles“. Es-se-n. Komence de decembro malfirmiĝis 5 kursoj por geinstruistoj, gvid. f-ino Trutnau, s-o Schlenkert kaj Hermes. Samtempe „Humboldt“ Supera Realskolorio malfirmis kurson por gimnazianoj de la superaj klasoj, gvid. s-o Schulte.

Kaj ĝi staris embaraste, dum ĝiaj neniam antaŭe plorintaj okuloj pleniĝis per larmoj.

— Mi ne scias!

La maljunulo ekkompatis la beston:

— Do, bone, sed ne faru tion real!

Kaj denove feliciĝis — ne koleras plu la maljunulo! — la linkino levis al li sian piedon por la adaŭto. La maljunulo premis la pikilharan piedon kaj diris:

— Mi ne koleras plu, mi ne koleras!

Kaj la linkino forkuris ŝvingante la voston por felico.

— Kia malprudentulino! — ekpensis la maljunulo.

Beninte la foriranta bonan tagon li fleksis la genuojn por vespera preĝo.

### III.

Multajn donacojn portis la homoj al la maljunulo rekompenco por lia helpo: infanoj alportadis stajn ludilojn, gepatroj manlaboraĵojn kaj panon — kaj ĉion la maljunulo oferis al tiuj, kiuj estis en mizero, sed la ŝafan felon li donis al neniu, ĝi restis kuŝanta en lia ĉelo, tiu donaco de la linkino.

Tion, kion povas ekkompreni homoj, ne povas kompreni la linkino kaj, alportante la donacon, ĝi agis laŭ sia besta prudento, sed homo havas talenton rigardi profunde en la vivon, kvankam la finiĝo de tiuj profundaj ankaŭ li ne povas kompreni kaj por li restas solaj serĉado kaj ĉagrenoj. La larmoj de la linkino estis kvazaŭ homa ĉagreno, kaj homa ĉagreno estas la sola lumo de la vivo.

El rusta lingvo tradukis N. Hohlöv.

\*) Aleksěj Remizov estus unu el la plej bonaj kaj konataj modernaj rusaj stilistoj. Perfekta kaj ĝisfunda kono de la popola rusta lingvo, de rusaj antikvaj tradicioj kaj vivmanieroj, speciala artisteco de la aŭtoro en uzado de la sincera, simpla kaj pitoreska popola idiom, kunigita kun la vera aristokrata de la animo, donas al A. Remizov tre gloran kaj rimarkindan lokon en la nuntempa rusta beletristiko.

La tradukinto.

## Jugoslavio.

Brčko (Bosnio). Kurso kun ĉ. 15 p. en ejo de kultursocieto „Jugoslavenki Klub“, gvid. s-o K. Klimek.

## Litovujo.

### Memel-Territorio

Memel. Senkoŭta kurso por laboristoj ĉiujlande kun 12 p. (komence 18). Kurso 3 senpaĝaj miksitaj kursoj lunde, marde kaj merkrede. Partoprenantoj post la dua vespero entute pli ol 100.

Rokiškis. La 15. 11. la esp. rondeto de gimnazianoj aranĝis literaturvesperon. Paroladis J. Žiurlys. — 30. 11. en gimnazia domo parolado de instruistoj J. Vitulis „La demando de la lingvo internacia en la Ligo de Nacioj“ por urbanaj kaj gelernantoj. — La 3. 12. por gimnazianoj malfirmiĝis kursoj kun 25 p.

## Polujo.

Lublin. Loka filio de PEA vige agas. Du kursoj kun 30 p., gvid. s-o Pruski, ius finiĝis; tria kurso, gvid. s-o Lelek, bedaŭrindigis. Grandaj aŭtoj anoncas novajn kursojn dum 1925 por policoj, komercistoj, fervojoj kaj por post-telegrafistoj. Loka tagjurnalo „N. Ziemia Lub.“ publikigis dum novembro 26 presp. sciigojn. — Kunvenoj lunde kaj vendrede ĉe sir. Namiesnikowska 37-1.

Warszawa. Esp. rondo „Progreso“ fondiĝis la 22. 11. ĉe Profesia Asocio de Komerc- kaj Kontor-Oficistoj, sir. Ziela 25; paroladon faris s-o Koss. kursolin de la rondo gvidas s-o Bronstein kun 20 p. La 3. 1. komencas nova kurso, gvid. s-o Koss. — „Głos Pracowniczy“, oficiala organo de supre nomita Asocio, aperanta en Katowice, malfirmis konsistantan esp. fakon.

Tagjurnalo „Warszawianka“ (Varsovia gvid.) de 27. 11. enhavis s. t. „Senacia“ kalmunian artikolon kontraŭ lingvo internacia, Zamenhof kaj Esperanto. I. a. ni legas la konsilon, ke ĉiuj zoologoj, kiuj serĉas la ŝtupon inter simio kaj homo, serĉu tiun ĉi ŝtupon inter aŭtoroj de lingvo internacia. S-o Adolf Nowaczynski, aŭtoro de la artikolo, aldonas al sia konsilo la frazon: „Ho, Zamenhof! Ho mankanta ŝtupo inter Tjano (Tarzaro) — Red.“ kaj paviano!“ — Jen ekzemplo, al kia barbaro kondukas la kontraŭ-esperantismo. L. Kronenberg.

## Rumanujo.

Bucuresti. La 15. 12. okazis Zamenhof-memoro kun paroladoj kaj deklamoj. Adiaŭa parolado de s-o pastro Andreo Ĉe, dum pluraĵaroj ĉefdel. de UEA en Rumanujo kaj ĝen. sekr. de Esp. Centro Rum. La lastaj insligaj vortoj de la tutlande amata gvidinto rezultigis tujan enskribiĝon de 40 membroj al UEA.

Cluj. La 12. 12. la klujaj samideanoj are salutis ĉestadidome iraveturantan samideanon anglan, s-on Harold Jackson. Oni aranĝis bunsukesan Zamenhof-vesperon. Esp.-kurso de s.- prof. Cornea finiĝis kun pli da anoj, ol ĉe komenco estis.

Targu-Mureš (Transilv.). Nova kurso komenciĝis la 8. 12. La enkondukant konferencoj faris eminenta verkistino s-ino Maria Berde, Instruist. s-o D. Toevisŝy.

Timișoara (Banato). Nova kurso komenciĝis la 20. 11. en Fervojista Hejmo de C. F. R., por 20 personoj. Instruas s-anoj Balint kaj Dioszegi.

Esp. Centro, Rumana.

## Ruslando.

### Ruĝa Helpeo Internacia uzas Esperanton.

Laŭ „Sennaculo“ la Ekzekutiva Komitato de Int. Komitato por helpeo al revoluciaĵtalantoj (Ruĝa Helpeo Internacia) en sia kunsido de 2. 12. decidis uzi la praktikan servon de proletaĵ esperantistoj por diskonigo de sia agado, por publikigo de siaj materialoj pri la situacio de politikaj en karcerigoj en kapitalistaj landoj kaj por helpi kaj plirapidigi rilatojn inter siaj diverslandaj sekcioj.

## Ido.

„Mondo“ de nov-dec. enhavas liston de membroj de „Unio pro la Lingvo Internacia“, kiuj pagis koltizon de 1. 7. ĝis 1. 11. 1924. Laŭ ĝi pagis la Ido-federacio de Aŭstrio por 20 anoj, Ĉeĥoslovakio por 100, Finnlando 25, Francujo 115, Germanujo 61, Italujo 30, Luksemburgo 100, Svedujo 137, Svisujo 100.

## Interlingua.

Aperas nova „Revista Universale“, oficiala organo de Academia pro Interlingua. Adreso: Prof. W. de jezterski, Lida, Polujo.

## Ĉaso.

### De Hermann Petermann.

Revante li kuŝis en la alta herbaro. Senfine verdaj herbarebenoj etendiĝis ĉirkaŭ li. Trunketoj kaj floroj atabe albancis al li. Nelacigante zumis abeloj kaj muŝetoj unutonajn melodiojn. Meditante li rigardis en la vastajon, kvazaŭ li estus serĉanta ion — en ĉielbia malproksimo.

Jen preterfliris ep ŝanceliganta flugo papilio de stranga kolorbrilego. Preskaŭ tuŝis lin la delikataj flugiloj. Eke li saltis kaj ĉasis la multkoloran papilion —

Estis freneza ĉaso. — Febre ekbrilis liaj okuloj, kiam li kredis fine ekpakti ĝin. Sed ĉiam vane. — Do li ne lasis la sovaĝan kurĉason, — kaj li ne vidis, ke li disprenis per la piedoj multajn belajn florojn —

Kaj kiam la sangruĝa sunglobo mallevigis en la okcidento, li kuŝis ree en la alta herbaro — larmplena — kaj funebriis pri la floroj, kiujn li disprenis dum senseca ĉaso.

Ili estis nur al li florintaj kaj bonodorintaj.

## Enigma.

### Novjara bondeziro.

Viciguj la sekvantajn litergrupojn tiamaniere, ke vi ricevu la versforman deziron:

alla, cesp, espe, flor, ista, jaro, lena, nova, onda, rani, roek, tuum, usuk.

Leono Funken, Koblenz.

## Spritaĵoj.

— Bonvolu doni al mi la adreson de via tajloro!

— Volonte, se vi ne donos al li la mian!

## Ĝurnoj.

Patro: Estas malbone de vi, jeŝi la hundon per ŝtono. Feto: Mi ne volis trafi la hundon, sed nur muŝon, kiu sidis sur ĝia buŝejo.

## Korekto.

Oni informas nin, ke la nomo de „Baffleria Arnoldi“ (en art. „Superalativo“, ET 226) devas esti „Rafflesia Arnoldii“.

W. Th.



Bibliografio.

Libroj, propagandiloj ktp.

Fraŭlino Julie. Naturalista tragedio de A. Strindberg. Tradukis el sveda lingvo Paul Nylen kaj S. E. Krikorj...

Esp. gazetoj.

La Movado, jan. Adreso: 97, rue St. Lazare, Paris 9. — Aperas post ĉesigo de „France-Esperanto”...

Gazetaro.

Diario de Lisboa, 18. 12. Art. pri D-o Zamenhof kun lia portreto. Revista del Ateneo, Jerez de la Frontera, dec. Tripaĝa art. esp.-hispana...

Libera tribuno.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale esprimataj ĉiuj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin ĉiun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi neadekvajn artikolojn.

Leterkesto.

E. Kl. en Ch. Dankon pro letero, raporto kaj artikolo, kiu rememorigas al ni jam pripensitan planon de „Verda Armeo”.

Esperanta Ligilo.

La Lumo de niaj sendidaj gefratoj. Esfimataj gesamideanoj, dum gaja novjara festo, dum renoviĝas la jaro, renoviĝu ankaŭ via donaco al „Esperanta Ligilo”, plej grava beno monata de niaj sendidaj gefratoj.

Nedaŭraj Reenkorpigoj en Mantes.

Nia s-ano J. Thiébaul, membro de la Psika Societo en Nancy, aldonigas la duan parton de sia spiritalista verketo kiel specialan folion al la hodiaŭa numero de ET.

La Poŝtabono.

Estas nekredinde, kiajn malfacilaĵojn la poŝto de diversaj landoj faras al la poŝtabonantoj. Multaj oficejoj asertas, ke nia ĵurnalo tute ne estas abonebla per la poŝto.

Bedaŭrinde multaj legantoj tute ne scias, kia estas poŝtabono. Ili opinias, ke estas poŝtabono, se ili sendas al ni la abonpagon per poŝtavigo aŭ poŝteko.

Presejoj! La presado kaj eventuale la liverado de papero kaj kiliŝoj por amas-eldonaĵo de libroj — estas akirebla. Kontraŭ 2 sv. fk. aŭ egalvaloro estas sendata kajero kun detalaj kondiĉoj.

ESPERANTIO

internacia belege ilustrita 16-paĝa monata esperanta revuo por arta kaj socia vivo, literaturo, scienco, sporto, flatelilo, humoro ktp.

„Esperantio”, P. Hitrov, Berlin-Charlottenburg 2, Fach 18.

Rekomendata de la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto. La eldonon de la sola arta literatura monata esperanta revuo Literatura Mondo transprenis: Hungara Esperanto-Instituto, Budapeŝt VI Eötvös-u. 3.

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj por minimume du sinsekvaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 10 vortoj egalvaloro de 0.60 sv. fk. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazantaj gravaj esp. kunvenoj, paroladoj, festoj, k. s.) estas senpaga (unufolia enpresoj).

CILU SAMIDEANO, kiu parolas pri tutmondeco de Esperanto, trompas, se li nenion faras por tion pruvi! — La publiko neesperantista ne priatendas nudajn parolojn, sed nur paleblajn faktojn.

ET n-o 184 SERCATA. Por ĉiu numero 184 (kun Revuo n-o 3) resendas al ni, li liveros libron laŭ elekto (Malriĉa en spirito, Oni ridas, Bukedo, Taglibro de vilaĝ-pedelo) aŭ 4 novajn numerojn de „Heroldo de Esperanto”.

POR RUSIO! Plena Esperanto-lerolibro kun gramatiko, ekzercaro, lego-libro kaj du (esperanto-rusa, rusa-esperanto) vortaroj.

LETERVESPERO KUN EKSPOZICIO estas aranĝota. Dezirataj estas urbidaj (magistratdomo, preĝejo, poŝt-oficejo, stadomando) bildflanke afrikante. Certan respondon garantias la delegio. Litempo por alveno de PK: 20. 1. 1925.

GRAVA ENKETO. Kiuj ses libroj estas laŭ via plej bona kaj belaj? La respondantoj bonvolu aldoni sian adreson kaj meilon al s-o J. Munter, Klundert, Holland.

GRAFIOLOGIO! Klaraj juĝoj de la kapableco psikaj estas projektataj per P. Beier, Ottendorf ĉe Greiffenberg, Germanujo.

LETERVESPEROJN aranĝos la 29. 1. kaj la 12. 2. 25 la esp. grupo Syke. Eksterlandaj gesamideanoj bonvolu sendi il PK, L, PM ktp. por nia propaganda vespero al Heino Lange, Syke apud Bremen, Bassumerstr. 131. Respondo garantiata.

LETERVESPERON aranĝos la Germana Esperanto Societo Reichenberg, Ĉeĥoslovakio, la 16. 1. 1925 por propaganda celo kaj petas ĉiujn eksterlandajn gekorespondantojn je il PK kun marko bildflanke.

PROPAGANDO. S-o Frans Albert Quist, Brunnsviks Folkhögskola (popolalilerno), provinco: Dalarne, lando: Svedujo, deziras nepre ricevi belegajn kartojn, leterojn kaj personajn fotografiajn de gesamideanoj en tuta mondo por esp. propagando je fama sveda popolalilerno.

La Vie Amandinoise, St. Amand, Radio. Les Tablettes de St. Quentin, 22. 11. Esp. kaj poŝto-telegrafo. La Dépêche Dauphinoise, Grenoble, 8. 11. Esp. kaj parisa komerca ĉambro.

Ĵ. Žiurlys, gimnazio, Rokiskis, Litovio, gimnazio de la oka klaso, deziras korespondi kun alilanduloj pri sciencaj aferoj, vivkondiĉoj kaj esp. movado.

S-o Jordan Angelof, kooperativa orkestro, Stanimaka, Bulgario, petas tujmondan korespondadon.

S-o Pekny, Krakov, Podgorz, Polujo, deziras korespondi per il PK, nur kun seriozaj samideanoj en la tuta mondo, kiuj ankaŭ ĉiam respondas. Mi deziras urb-kaj naturo-vidojn kup priskribo.

S-ano Vitoldo Miĥalski, Varsovio, Polujo, sir. Czerniakowska 223-79, deziras korespondi per L kaj PK kun ĉiuj landoj. Certe kaj nepre respondos al ĉiuj, kiuj skribos.

S-o Wilhelm Biller, horlogisto, Berching i. Opf. (Bavarujo) Germanujo deziras korespondad kun la tuta mondo per il PK kaj L. Mi interŝanĝas kaj kolektas precipe il PK kaj fotografiajn de miaj korespondantoj. Mi respondas kaj sendas ĉiam kaj tuj.

S-o Debarbieri Guglielmo, Via Casaregis, 35, Genova, Italujo, deziras interŝanĝi PM kun gesamideanoj de la tuta mondo.

S-ino Helena Czechowska, Polujo, Boryslav, deziras interŝanĝi kun ĉiulandanoj arbidajn, pentraĵojn. Presaĵoj ne pli karaj ol 80 poŝtkartoj frankaj. Samvalora sendo tuj.

Filatelistoj atentu! En Nederlando estas eldonataj tri poŝtmarkoj por protekto de nezorgitaj infanoj. Prezoi: hfl. 0.04, 0.11, 0.12 1/2. Sendu monon rekomendite antaŭ la 15. 1. 1925.

S-o Josef Purmann, Tschernina 105, ĉe Arnau, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per il PK kaj L kun la tuta mondo. Mi respondos ĉiam.

S-o Anton Peikert, Arnau 211, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi kun la tuta mondo per il PK kaj L. Mi ĉiam respondos.

S-o Kaarlo Orjanne, Finlando, Koliola as. (ĉe Viipur) deziras korespondadon kun ĉiulandaj samideanoj per il PK pri la temo artoj.

S-o Tolman Karel, instruisto, Praha-Smichov, Zallanska 1550, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi PM kun la tuta mondo.

S-o Jan Ev. Slávek, oficisto, Praha-Zizkov, Chodska 14, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi il PK, ev. PM, L kun tuta mondo. Mi respondos ĉiam.

Mi deziras interŝanĝon de PM kun ĉiuj landoj de mondo. Interŝanĝe proponas tujan Persuajon. Bazo por interŝanĝo „Yvert et Tellier 1925”. Duplikatitoj ne akceptas, ĉiam respondas, preferas konstantan interŝanĝon. Adreso: S-o D-o B. Korona, Banko Ruspers, Theran (Persujo).

Heilbronn a. N. (Germ.) La Esp. grupo serĉas ankoraŭ kelkajn gekorespondantojn el ĉiuj landoj. Ĉiam kaj tuj respondos: il PK bl. Oni turnu sin al la prezidanto s-o Fr. Bachmann, Bahnhofstr. 5-1. Heilbronn a. N. (Germ.)

S-o Josef Kuszynski, Varsovio, str. Marijensztadt n-o 6, Polujo, deziras korespondi kun gesamideanoj de la tuta mondo per il PK kaj L pri diversaj temoj.